

# Aleksandro la Unuiginto.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, karaj amikoj!

Estis aŭtuna vespero. La horloĝo montris la 7-an horon. Mi sidis en la granda atendejo de l'radio-stacio en Brno. Estis mardo, do tago de esperanta kurso. Subite frapis nin ĉiujn nekredebla telefona sciigo ... kaj dume kolektiĝis ĉe siaj radio-aparatoj la diligentaj aŭskultantoj, la estontaj pacaj batalantoj por nia alta Ideo. Sed anstataŭ mia kutima deziro de bona vespero disflugis sur la ondoj de l'etero tra la tuta mondo terura novaĵo. Ĝi flugis trans valojn kaj montarojn, ĝi flugis trans riverojn kaj marojn kaj ĉie en urbo kaj vilaĝo angoro ekpezis sur ĉies koro kaj animo, kies orelon ĝi atingis. Kio okazis?

La gastama Francio preparis brilan akcepton al sia eminenta gasto kaj amiko la jugoslava reĝo Aleksandro. Sed la ĝojo kaj entuziasma bonvenigo ŝanĝiĝis en doloron kaj malesperan silenton: malbenita mano de murdisto mortigis en Marseille tiun, kiun li opiniis baro al sia krima celo.

Kion celis la krimulo? Forigi la heroan unuiginton de l' jugoslava popolo kaj faligi fortikan kolonon de l' paco. Estas nekredeble, sed tamen ekzistas homoj, kies korojn ne tuŝis la maro de larmoj, la maro de sango de l' Mondmilito. Ilia programo estas la ĥaoso kaj pro sia eta celo ili kapablas denove ĵeti la tutan homaron ĝis fundo de l'mizero de nova milito.

Sed mortis ne nur la reĝo. Ĉu vi memoras la bildon, kiun alportis la gazetoj, la bildon de feliĉa familio? Ĝi montris patron, patrino kaj tri sanajn amindajn infanojn. El tiu ĉi feliĉa rondo familia elŝiris la fiulo la patron, la edzon. Post la ĉerko paŝis ne reĝino kaj reĝidoj, sed funebranta vidvino kaj plorantaj orfoj, ĉar antaŭ la majesteco de l'morto malaperas titoloj kaj rangoj kaj aperas la kerno de ni ĉiuj: la homo trairinta tra la puriga doloro. Jes, mortis kuraĝa sed pacama reĝo, mortis amata kaj amanta patro, mortis fidela edzo, sed antaŭ ĉio mortis bona homo. Je lia flanko mortis alia pura homo, la granda idealisto, kiu kredis kaj laboris por la Unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo, ideo, kiu estas tiom kara speciale al ni esperantistoj: mortis Louis Barthou.

Amikoj!

Hodiaŭ ni kunvenis, por ĉeesti la solenan transsendon de tero al la tombo de l'mortinta reĝo. Velehrad, la simbolo de nia miljara historio, Tábor, la simbolo de nia plej glora epoko en la pasinteco kaj Bradlo, la simbolo de l'estanteco kaj fina reunuiĝo de la ĉeĥoslovaka popolo, tiuj ĉi tri lokoj donas sian teron al tiu, kies morton priploris la tuta ĉeĥoslovaka popolo same kiel la jugoslava. La tero de tiuj ĉi al ni sanktaj lokoj estu por eternaj tempoj atestanto pri la profunda amo, kiu ligas la ŝtaton de Masaryk al la ŝtato de la granda mortinto Aleksandro la Unuiginto.

Th. Kilian.  
17.3.1937.